

07

The American  
**ESPERANTO JOURNAL**

OFFICIAL MAGAZINE OF THE  
AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

ESPERANTO  
AUXILIARY  LANGUAGE  
INTERNATIONAL

VOL. I

NOVEMBER, 1907

No. 11

# The American Esperanto Association

(Founded 1905.)

*Honorary President*—Dr. L. Zamenhof.

*President*—Prof. G. B. Viles, Ohio State University.

*Treasurer*—Stephen W. Travis, Jr. *Secretary*—John Fogg Twombly.

Publication Office of the American Esperanto Journal is at 34 Green St., Brookline, Boston  
Postal District, Mass., U. S. A.

The American Association exists for the following purposes:

- 1) To furnish information about Esperanto.
- 2) To provide students with proper books.
- 3) To provide certificates of proficiency in the language. Specimen examination papers sent for 10 cents.
- 4) To publish the American Esperanto Journal.
- 5) To unite with one another individual Esperantists and, especially, the Local Esperanto Societies.

Membership in the Association, including a year's subscription to the American Esperanto Journal, \$1.50. Send all membership dues to the Secretary, Am. Esperanto Ass'n, Boulevard Station, Boston, Mass.

## AFFILIATED ORGANIZATIONS:

*Help us and help yourselves by becoming affiliated with the American Esperanto Association. This will cost you only \$2.00. Send the necessary information and money to the American Esperanto Association, Boulevard Station, Boston, Mass.*

Los Angeles Esperanto Society.....Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.  
San Diego Esperanto Society.....C. A. Babcock, Jr., R. F. D. 1, San Diego, Cal.  
New Britain Esperanto Society.....Rolland B. Moore, P. O. Box 700, New Britain, Conn.  
Washington Esperanto Society..Chas. W. Stewart, 1211 Kenyon St., N. W., Washington, D. C.  
Emory Esperanto Club.....Jack Dempsey, Emory College Oxford, Ill.  
Illinois Esperanto Association.....Edwin C. Reed, Ashton Block, Rockford, Ill.  
Chicago Esperanto Society.....Carleton W. Washburne, 553 Jackson Blvd., Chicago Ill.  
Leibniz Esperanto Club.....Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.  
Univ. of Chicago Esperanto Society.....Miss M. E. Smith, 6043 Ellis Ave., Chicago, Ill.  
Elgin Esperanto Society.....Dr. Clara L. Todson, 23, The Spurling, Elgin, Ill.  
La Juna Stelaro.....D. A. Johnston, Y. M. C. A., Rockford, Ill.  
Rockford Esperanto Society.....Derwent Whittlesey, 1815 Elm St., Rockford, Ill.  
Esperanto Club of Rockford.....Chas. Froeding, 1216 20th Ave., Rockford, Ill.  
Indiana Esperanto Association..Mrs. Winifred S. Stoner, U. S. Marine Hospital, Evansville, Ind.  
Juna Espero Esperanto Society.....Miss Julia Bierbower, 610 Upper 1st St., Evansville, Ind.  
Non Nobis Solum Esperanto Club....Miss Sadie Rucker, 1025 Chandler Ave., Evansville, Ind.  
Indianapolis Esperanto Society.....Miss Mary McEvoy, 21 E. Ohio St., Indianapolis, Ind.  
Kansas State Agri. College Esperanto Club.....Andrew J. Wheeler, Manhattan, Kan.  
Portland Esperanto Society.....Herbert Harris, "The Somerset," Portland, Me.  
L'Espero Esperanto Club.....Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Me.  
Massachusetts Agri. College Esperanto Club..E. Victor Bennett, 25 N. College St., Amherst, Mass.  
Boston Esperanto Society.....Edward K. Harvey, Perkins Institution, S. Boston, Mass.  
Esperantaj Pioniroj.....Aron D. Wolpe, Perkins Institution, S. Boston, Mass.  
Cantabrigia Esperanto Group...Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.  
Harvard Esperanto Society.....H. R. Shipherd, 669 Dana St., Cambridge, Mass.  
Marsh Esperanto Club.....F. W. Woolway, 77 Union St., Newton Centre, Mass.  
Worcester Esperanto Society.....Herbert K. Cummings, Polytechnic Institute, Worcester, Mass.  
Winona Esperanto Club.....Rev. J. I. Cleland, 278 W. Fourth St., Winona, Minn.  
St. Louis Esperanto Club.....Mrs. Meade C. Dobson, 4604 McMillan Ave., St. Louis, Mo.  
Good Templars Esperanto Club.....Harry C. Welsh, c.o. M. M. Co., Missoula, Mont.  
First Nebraska Esperanto Club.....Mrs. E. A. Russell, Ord, Neb.  
Searchlight Esperanto Society.....Dr. E. W. Newell, Searchlight, Neb.  
Auburn Esperanto Society.....Clarence F. Welch, Recorder's Office, Auburn, N. Y.  
Brooklyn Esperanto Society.....Durbin Van Vleck, 154 Hancock St., Brooklyn, N. Y.  
New York Esperanto Society.....Stephen W. Travis, Jr., Tenafly, N. J.  
Columbus Esperanto Society.....M. Janet Rogers, 403 Luchhaupt Ave., Columbus, Ohio.  
Esperanto Club of Ohio State Univ.....Charles W. Park, Ohio State Univ., Columbus, Ohio.  
Toledo Esperanto Club.....H. S. Blaine, P. O. Box 999, Toledo, Ohio.  
Philadelphia Esperanto Society.....Lewis B. Lueders, 206 6S. 41st St., Philadelphia, Pa.  
Jamestown Esperanto Club.....Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.  
Seattle Esperanto Society.....Wm. G. Adams, 309 27th Ave., Seattle, Wash.

# The American Esperanto Journal

Vol. I

NOVEMBER, 1907

No. 11

THE American Esperanto Journal is published by The American Esperanto Association. It is the official organ of the Association, and also of the local Esperanto societies in Boston, Chicago, New York, Philadelphia, Los Angeles, Seattle, etc. It is issued monthly by the Association and will aim to be especially useful to beginners.

All writers to the Journal must observe the following rules:

1. Write legibly or, preferably, "type-write."
2. Use paper as large as that of the Journal.
3. Write only on one side of the sheet.
4. Leave large spaces between the lines.

The Editors reserve the right to correct and to reject all manuscripts. No manuscripts will be returned except in the case of articles rejected, and only then, when such articles exceed 500 words in length, and are accompanied by return postage.

The American Esperanto Journal is a "propaganda organ." The editors and other workers on it give freely of their time and labor; writers of articles must do likewise.

Address articles to the REDAKTORO, AMERICAN ESPERANTO JOURNAL, Boulevard Station, Boston, Mass. News articles should be addressed to the REDAKTORO DE KRONIKO.

## AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

One subscription with membership in the American Esperanto Association.....\$1.50  
Journal alone, subscription price..... 1.00

Send all subscriptions to the *Secretary, American Esperanto Association*, Boulevard Station, Boston, Mass. Change of address costs 10 cents; no changes made during the summer months; your postmaster will forward your Journal during the summer for a few cents. Please address all complaints to the Secretary. The Journal does not regularly appear until the middle of the month; in July, August, September and October, not until the end of the month. For advertising rates address Stephen W. Travis, Jr., Business Manager, Tenafly, N. J.

La Internacia Lingvo ekzistas por praktikaj celoj. Ĝi ne estas teoria ludilo de filologistoj, nur amuzaĵo de lingvoamantoj. Se tio estus, ĝiaj propogandantoj efektive estus elkonsumintaj plej senutile siajn fortojn, monon, kaj tempon. Ju pli baldaŭ do ili forlasus la aferon, des pli saĝe ili agus.

Esperanto tamen ne estas tia ludilo: ĝi pretendas kaj pretendis por si tute alian rolon. Ĝi estas tro saĝa por pensi ke ĝi *en si mem* estas inda je laboro kaj studado: kontraŭe ĝi estas inda je tiuj ĉi nur pro sia utileco, pro sia helpado, en pli gravaj aferoj. Alivorte, Esperanto ne estas io en si mem; ĝi estas ne nur helpilo por aliaj aferoj sed por tiuj ĉi tre grava helpilo.

Tial Esperantisto kiu kontentigas sin per la studado kaj eĉ per la ellernado de la internacia lingvo kaj tiam haltas, kaj ne rilatiĝas kun fremduloj per helpo de tiu ĉi lingvo, estas ne vera Esperantisto. Nek eĉ la korespondado kun fremdulo pri vantaj aferoj per praktiki la lingvon ne estas longatempe kontentiga,

Dum mallonga tempo tiu povas esti amuzo, kaj eĉ helpilo por la ellerno de la lingvo. Baldaŭ tamen tia korespondado velkiĝas pro manko de intereso, pro manko de ia efektiva realaĵo.

Ni konsilas do al niaj legantoj ke ili agu tute malsame. Studu la lingvon, ellernu ĝin, korespondadu kun fremduloj, sed faru ĉion tion por definitiva celo. Rilatiĝu Esperanton kun io serioza, grava, en via vivo. *Abonu la ĵurnalojn rilatantajn kun tiu gravaĵo.* Jam estas kelkaj da ili. Se vi estas sciencisto, venigu la *Internacian Sciencan Revuon*. Per ĝi rilatiĝu kun aliaj Esperantistaj sciencistoj; pruvu ke Esperanto povas valori inter la sciencoj; antaŭenirigu kune vian sciadon de scienco kun via sciado de Esperanto.

Se vi en via hejma lando interesiĝas pri la internacia paco vi devos helpi tiun ĉi aferon per abono al la *Espero Pacifista*. Eble vi abonis ĵurnalon pacifistan en via propra lando; sed tio ne malhelpas vin aboni ankaŭ internacian pacifistan organon. *Internacia ĵurnalo, redaktita en internacia lingvo, kaj subtenata de*

*Internacia Societo Esperantista por la Paco, ŝajnas estas ĝuste la konvena organo por paco internacia. Ĝi bezonas vian helpon; kaj vi bezonas ĝian helpon, kiel en la "paca" propagando tiel ankaŭ en la esperanta.*

Tiel ni povus daŭrigi nian predikon, alvokante al ĉiu rilatiĝi kun iu serioza afero per Esperanto. Aparte ni petas al ĉiuj Esperantistoj Romanaj Katolikaj, ke ili ne forgesu sian propran ĵurnalon, la *Espero Katolika*, bonege redaktatan de l'Abbé Peltier.

*Denove, ni ripetas ke Esperanto en si mem ne estas inda je laboro kaj studado. Ĝia graveco konsistas je la helpo kiu ĝi povas alporti al aliaj gravaj aferoj. Se tian helpon ĝi ne povas alporti, ĝi pereos, kaj juste. Ĉiu el ni elektu la kampon sur kiu Esperanto povas helpi lin, kaj tuj aboni la ĵurnalon esperantistan kiu laboras sur tiu kampo. La naciaj propagandaj ĵurnaloj ne povas helpi tie; ili estas nur semantoj de la bona semo. Por ricevi rikolton, oni devas labori per la fakaj ĵurnaloj kaj societoj.*

Tiuj ĉi "modernaj maŝinoj de la civilizacio intelekta" bezonas monon por sia agado. Ne forgesu tion; kaj abonu hodiaŭ unu el la ĵurnaloj kies adresoj troviĝas sur la tria paĝo de la kovrilo de nia ĵurnalo.

The American Esperanto Association has now over five hundred members, and about as many more subscribers to the Journal, who are not members. We have not yet finished the first year of the Journal, and we ought to consider that so far we have done very well.

But there remains much more to do, both for the Journal and for the Association. Until the present time both have necessarily been mere tentative efforts and have labored under the disadvantage of rather unorganized methods. This has been due not only to the newness of our movement, but to the great extent of our country.

The first difficulty—the newness of our movement—we shall soon outgrow; but, in order to conquer the latter, *we must divide our work according to the territory to be covered.* One general center for information and for the sale of books for a country so large as the United States is insufficient. There should be a dozen such centers. Local clubs and individuals should as soon as possible combine in State Federations, or at least in "Sectional" Federations. Illinois has set the example with the founding of the Illinois Asocio Esperantista, which event took place

July, '07. This State Association has taken in practically all the clubs in Illinois. It is answering letters, selling books, sending out lecturers, etc. In other words, it has become a propaganda center for Illinois and the surrounding States. It has relieved the American Association of much labor; what is more, it has done much which a National Association cannot possibly do—it has aroused local enthusiasm, it has enabled the local Esperantists to get together and become acquainted, and it has thereby enlisted the services of many who would otherwise be standing idly by with folded arms while the National Association is overwhelmed with work.

We, therefore, advise all local groups to form local federations just as soon as they can. *If you are not strong enough to form a State Federation, combine with one or more other States and form a "Sectional" Federation.* Let all in the Middle Atlantic States, for instance, combine with the Philadelphia Society to form a Middle States Association; let the New England States write to the secretary of the Boston Society to see what can be done about forming a New England Association; let those on the Northwest Pacific Coast look to Seattle, etc. And, if you want practical advice as to the method of forming your federation, write to Mr. Edwin C. Reed, Secretary of The Illinois Esperanto Association, Ashton Block, Rockford, Ill.

Every Member of the A. E. A. is requested to send, *as soon as possible*, to Secretary American Esperanto Association Boulevard Station, Boston, Mass., U. S. A., his name, A. E. A. number, address, and memorandum as to his degrees (earned or conferred), and statement as to whether he wishes to correspond in Esperanto.

Please write this out on a *separate slip of paper*. State whether you have read the *Krestomatio*; also whether you wish your correspondence to be limited to *foreigners alone*.

Every *Esperanto organization* affiliated with the A. E. A. is requested to send to Secretary American Esperanto Association, Boulevard Station, Boston, Mass., U. S. A., the following items:

1. Name of organization.
2. Date of its formation.
3. Name and address of its corresponding officer, and of its consul, if it has any.
4. Statement as to whether it wishes to join a State Federation.

## ENGLISH AS AN INTERNATIONAL LANGUAGE

BY BERNARD MACKENSEN, San Antonio, Texas

Obstacles to the Solution of the World-Language Problem by a National Idiom.

Assuming that the early establishment of an international language is desirable—and what intelligent person would deny this?—we are confronted with the problem\* as to what language is to be chosen for this purpose. A solution that suggests itself readily is the adoption of one of the existing national idioms; but a little reflection reveals two serious obstacles.

1. National Pride and Political and Economic Interests. "It is practically impossible for all nations to agree to adopt for international use the language of one among them. Such a choice would hurt not only the legitimate pride of other nations, but also their political and economical interests, for it would confer upon the favored nation an enormous advantage in commercial and scientific relations with its rivals."—*Dr. Louis Couturat*, (professor in the University of Toulouse), delegate of the International Congress of Philosophy, August, 1900.

2. Difficulty of Acquisition. This is due to irregularities of grammar, pronunciation, spelling, and word-formation, and to difficult idioms and unwieldiness of vocabulary. This last quality is well illustrated by the English language, whose immense vocabulary consists in large part of linguistic lumber—obsoletisms, archaisms, provincialisms, colloquialisms, variants, duplicates, etc. Such material would be useless and burdensome in a language intended only for international purposes, and much of it is so even in a national language with its varied applications.

### PROSPECTS OF ENGLISH.

It is the hope and belief of many among us that our mother-tongue is destined to play the important role of international language. The statistics as to the number of persons speaking the chief European idioms are: English, 130,000,000; Russian, 100,000,000; German, 75,000,000; Spanish, 70,000,000; etc. In each of these cases the increase is rapid, but the rate is greatest with the speakers of English. The question arises, When, if ever, will the English language be universal? In seeking an answer we should lay aside all

sentimentality and consider only the cold facts. To determine what these are I can do no better than to quote some of our own countrymen—not the country editor who periodically tickles the pride of his readers by the statement that *their* language will soon be universal, but men who are in a position to speak authoritatively.

Prof. T. R. Lounsbury, the foremost authority on the usages of the English language in the United States, and a member of the Simplified Spelling Board, says in his "History of the English Language": "Of the languages of Christendom, English is the one now spoken by far the largest number of persons; and from present appearances there would seem to be but little limit to its possible extension. Yet that it or any other tongue will ever become a universal language, is so much more doubtful, that it may be called impossible; and even were it possible, it is a question if it would be desirable."

United States Consul J. A. LeRoy, of Durango, Mexico, says in a recent report on the American method of extending trade in Mexico: "The flood of American catalogs and circulars that is poured into this country does comparatively little good. In any event, there are but few lines where catalogs in English will be of help."

Elihu Root, American Secretary of State, said in an address before the Trans-Mississippi Commercial Congress, November 20, 1906: "I will indicate some of the matters to which every producer and merchant who desires South American trade should pay attention: (1) . . . 2. Both for the purpose of learning what the South American people want and of securing their attention to your goods, you must have agents who speak the Spanish or Portuguese language."

From Mr. H. W. Harris, United States Consul, Mannheim, Germany, I quote the following: "A marvelously widening commerce admonishes the German authorities that the schools must teach the languages of that commerce. There can be no question as to the view that is taken here. The work of our schools as touching the needs of that commerce will do well to guard the same point. It

is a mere idle dream to suppose that in the near future Germany or France will lay aside their speech and adopt, even for business purposes, the English language. Rather will it continue to be as it is now, that those who would take an efficient part in the commercial and industrial intercourse between the great English, German and French speaking peoples must know at least two of these languages."

Even in Canada, it would appear, English has no prospect of becoming universal; for, as we read in "The Literary Digest" of June 29, 1907: "The French-Canadian moves forward in a united and solid phalanx of irresistible force of language, faith and patriotism." "It is frequently stated that in two or three decades no English-speaking people will be found in Quebec outside the cities and towns. This is probably a true prediction." "From the present outlook it would seem that the French-Canadians hold the future of Canada in their grasp...." This result seems all the more probable when we consider the wonderful prolificness of the French-Canadians and the strong and growing tendency of English-speaking Americans toward race-suicide.

I could give other evidence to show that the English language is far from being international—our consular reports abound in it—but every reasonable person must be convinced.

#### QUALIFICATIONS OF ENGLISH.

Let us suppose, however, that the various governments of the earth should agree to make English the international language and to make its study for a number of years compulsory in all but their primary schools. Would our problem have then been satisfactorily solved? As the answer will depend largely on the qualities of the language itself we must here review these qualities.

It may be said in favor of English that its grammar is comparatively simple, more so, indeed, than that of any other European tongue; that it is comparatively easy to acquire by word of mouth, a sufficient knowledge of the language for ordinary oral communication; and that it is concise, convenient, and expressive.

In discussing the unfavorable side of our language, we should bear in mind that equally serious objections may be made to its sister tongues, for the natural languages are very largely products of blind accident, rather than of intelligent effort, and are, therefore, en-

cumbered with a host of inconsistencies and useless difficulties. The chief qualities which tend to unfit English for an international language are:—

1. *The representation of the same idea by different words or roots.* Thus freedom and liberty are practically the same thing. One term would suffice. A greater number is an unnecessary burden for the learner. In the use of the same or similar root we often find even greater confusion; for example: *Receive, reception; despise, despicable; life, live, enliven, vivify, vivacity, vital, biology.* In the use of prefixes and suffixes we find the same harmful superabundance of forms. Take as an example the words *unequal, inequality, irregular, impolite, illogical, ignoble, disagreeable and non-essential.* All these prefixes here serve the same purpose—that of giving an opposite meaning. Why then not have a single prefix (as in German, etc.) that could be invariably applied for this purpose?

2. *Giving to the same sign too many meanings.* This is a frequent source of ambiguity. The extent to which this practice has been carried in English may be ascertained by looking up in the dictionary such forms as *spring, strike, bill, in-, and -ing.*

3. *Insufficiency of grammatical forms.* It is certainly not to be regretted that our language has dropped many useless endings, but unfortunately the process of simplification has in some cases gone too far, so that a want of clearness is the result. Nouns, particles, adjectives, adverbs and verbs may have the same form. In oral language the possessive case of nouns is identical with the forms of the plural. Sometimes there is no special form for the plural, as in the case of *you, deer, sheep,* etc. In some verbs the present and the past tense are identical in form.

Prof. J. P. Postgate, of Trinity College, Cambridge, has the following to say on the inexactness of the English language in his paper on "The Science of Learning": "The looseness and ambiguity of English expression is well known both to men of letters and statesmen. The great and statesmanlike writer, the late Sir John Seeley, once observed to me in conversation that this was so great as to make it a most difficult matter to draft a treaty in English."

Elias Molee says, in his book, entitled "American English": "So indefinite is the English language that a great American legal light stated, twenty years ago, that about

nineteen million dollars were spent in litigation annually in the United States, on account of the misunderstanding of words appearing in written contracts."

4. *Difficulties of Grammar.* Among these are the irregular verbs, about 175 in number, the hundreds of irregular plurals, etc.

5. *Harsh and Difficult Sounds and Combinations of Sounds.* *Asked, texts, sixths, widths, strengthened, clothes-lines.* "He strikes his fists against the posts, and still insists he sees the ghosts."

6. *Difficulties of Spelling.* Of all languages English has the most irregular and inexplicable system of spelling. The same sound may be represented by a number of different signs, and the same sign may have many different sounds or not be sounded at all. Signs for the sound a: *raze, raise, rays, tael, gaol, gauge, great, fete, matinee, eh, eight, they.* The various sounds of the sign a are found in the words *all, what, arm, ask, fare, at, ate, any.*

Attempts to reform English orthography have been made from the year 1200 to the present time. The problem is one of unusual difficulty in English, not only in the introduction of a new system, but also in the devising of a system that would be at all satisfactory. A complete reform in spelling would necessitate the introduction of many diacritical marks or modified characters, and would, moreover, create an immense number of irregularities in derivation, many even within the English language itself; thus, while *national* is now (except in pronunciation) regularly derived from *nation*, spelling by means of the Standard Phonetic Alphabet would result in making the root-vowel *a* different in the two words, the forms becoming *neshun* and *nashunal*; in other words, regularity of spelling would be gained at the sacrifice of regularity of derivation, and the irregularity in pronunciation would remain as before. The great havoc that this system (which is recommended by the highest au-

thorities) plays with the etymology of words is evident from a few examples: *mailej* (mileage), *cwolifai* (qualify), *riyunait* (reunite), *rediasun* (radiation). It should be noted, moreover, that the difficulties of accentuation would remain, and that the learner would still be puzzled, in spelling, by the numerous obscure vowels, as in the words *assistant, persistent, pedal, novel, cavil, carol, caster, castor, barren, baron, lumber, lumbar.*

(The diacritical marks, and modifications of the characters themselves, have been omitted.)

But we may as well dismiss the subject of thoro reform for, as Prof. Brander Matthews, chairman of the Simplified Spelling Board, says, "Any scientific phonetic reform is absolutely impossible." The platform of the Simplified Spelling Board, he says, is simplification by omission, "a principle which has been at work for centuries." It is a question, however, if irregularities are not arising as fast or faster than they are being eliminated by this principle. Still there is hope that the Spelling Board may be able to accelerate the operation of the principle and effect in time the limited reform that is possible, and in this they should have the hearty support of all of us who are interested in the welfare of the untold millions that are yet to speak English, for success would mean a lightening of the burdensome task that "robs our youth of years of time that should be devoted to the acquisition of knowledge."

In this day when the school curricula are already overburdened and the extension of human knowledge is constantly making additional demands on the time and energy of the learner, no fair-minded person could wish to impose upon all the world "this stupid task that damps and shrinks our intellectual life."

In view of these facts, it is not surprising that so many, even in English-speaking countries, should seek the solution of the world-language problem in one of the marvelously simple, and yet serviceable, artificial languages.

## KORESPONDADA FAKO

Tokio, Japan: Tai Suzuki, 66 Matsukiyochi, Asakusa, dez. kor. per bildaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

Boulogne-sur-mer, France: Victor Haig-néré, 149 rue du Moulin à Vapeur, dez. kor.

per poŝtkartoj ilustritaj aŭ ne.

Sro. H. Bicknell, 443 Tenth St., Portland, Oregon, U. S. A., deziras korespondadi kun fremduloj, kiuj ne parolas la anglan lingvon, aŭ letere aŭ poŝtkarte. Legis krestomation.

## ŬO KAJ JO

W. B. STERRETT (A. E. 49), WASHINGTON, PA.

La artikolo en la Aŭgusta numero, "Elparolaj Diskutoj," venigas antaŭen demandon de mi longatenditan. La instruon de la elementaj libroj, kiomaj ili vidiĝis (escepte la Cox'a enparte) mi opiniis malscienca kaj nesekvinda; kaj do en mia ekzercado mi faradis tion kio estis prava en miaj propraj okuloj. Aparte estis malkontentige ke la *North American Review* eksekvis la ordinaran senzorge-man manieron pritrakti la diftongojn.

Mi estis dum la tuta tempo preskaŭ certa ke mi havas la konsenton de la aŭtoritatuloj; jen la rimarko de redaktoro Twombly subdonita al la supredirita artikolo min kuragiĝis. Certege la tempo estas plene veninta por publikigi en nia Amerika Ĵurnalo klaran unuforman esprimon pri la diftongoj, eĉ se ilia preciza elparolado ne estas sufiĉe grava demando ĉiuj eklernantoj. Konfidante ke mia praktiko ricevos aprobon de l'samideanoj mi prezentas ĝin sub la titolo "ŭo kaj jo."

Kiel fundamenta principo, mi pretendas ke eĉ la Esperanta alfabeto ne estas absolute fonetika. Co, ĉo kaj ĝo reprezentas malsimplajn sonojn t-s, t-ŝ kaj d-ĵ. La voĉaj sonoj de l kaj r *komencaj* ne estas samaj kun la spir-sonoj de l kaj r *fermantaj*. Aparte graviĝas kompreni la du sonojn kiujn ŭo kaj jo reprezentas. Sekvate per vokalo ili egalas la anglajn literojn w kaj y (dublu kaj ŭaj). Sed kiam la vokalo antaŭiras kaj la ŭo aŭ jo staras finaj aŭ antaŭ konsonanto, ili reprezentas vokalojn mallongajn je kvalito kaj je kvanto (i en "it" kaj u en "put"). Kun ĝiaj dudekok literoj, la Zamenhofa lingvo havas dudeknaŭ elementajn sonojn krom naŭ diftongoj.

La konsonanta uzo de ŭo kaj jo estas tiel simpla kiel tiu de ia ajn konsonanto. Jen, jam, jo, juĝo; ĝojiga, pleje, reĝaĵa, vojo, boju; Ŭashington, ŭo; anstataŭi, antaŭe, hodiaŭa, adiaŭo, kontraŭulo—ji, je, ja, jo, ju—ŭi, ŭe, ŭa, ŭo, ŭu. En ĉiuj tiuj vortoj al ŭo, aŭ, jo kuniras la sekvantan vokalon kaj antaŭa vokalo devas lasiĝi en sia pureco. Tio estas, *se vorto finanta per diftongo ricevas vokalan sufikson, la dua parto de la diftongo konsonantiĝas*. Komparu "gaja" kun "bestaĵa," "naŭa" kun "napa" kaj sentu la forton de la temo, ke ŭ kaj j estas konsonantoj.

Restas klarigi la uzon de ĉi tiuj du literoj kiel diftongaj elementoj. Ekiĝante, mi aranĝu la vokalojn en la naturan serion laŭ la pozicio de l'ango. Formante i la lango estas plej antaŭa; formante u ĝi estas plej malantaŭa kaj la lipoj iĝas agemaj. La scienca serio do estas i, e, a, o, u. Ĉiu ajn el tiuj ĉi formas du diftongojn per aldono de ŭo kaj jo. En tiu uzo mi nomas tiujn aldonaĵojn vokaloj mallongaj; bona nomo estus lipa (aŭ ronda) kaj langa (aŭ supra) neniĝaĵoj (angle "vanishes").

La jo-a serio: ij, ej, oj, uj. Ij—se "Akademio" (preseraro: paĝo sepa, Aŭg. Ĵurnalo) estus korekta, la radiko "akademij"—montrus tiun sonon. Sed ij ne uziĝas. Ej kiel en "hejm" estas la longa aŭ diftonga a angle kiel en "day, whey." Komparu: "I'll drain him dry as hay." Aj kiel en angla "solfaing." Unu el la plej malfacilaĵoj kredigi la anglojn estas ke "long i," kiel en "kind," estas glitaĵo fore de la a de "father" al la i de "it." Kial alie silabadis ĝin per du vokaloj la latinoj kaj la grekoj? Oj kaj uj (kiel en "going" kaj "woeing") plenigas la serion. Se iu ajn el ĉi tiuj estas unusilaba, estas nepre la aliaj; t. e. se "hejm" estas unu silabo, ankaŭ estas "tuj."

La ŭo—a serio: uŭ, oŭ, aŭ, eŭ, iŭ. Uŭ kaj oŭ ne uziĝas. Tamen diftonga oŭ, kiel en "soul, snow," estus bona aldono al Esperanto. La vortoj boato kaj toasto (nun mallongigita al *toŝto*) bezonas ĝin. Kiom pli bona estus "boŭto" kaj "toŭsto!" Aŭ estas la plej ofta diftongo en nefleksiaj formoj. Tiu ĉi finiĝo, kiel en "almenaŭ," estas unu el la plej lertaj eltrovoj de nia majstra aŭtoro. Kio pri eŭ? La franca maniero, klarigita de Dr. Talmey, estas la sola defendebla. Generalo Cox diras "ehoo." Ĝin elparoli en la germana maniero, t. e. "oy" kiel en "boy" (laŭ ordinaraj gramatikoj) egaligus ĝin kun unu el la jo-a serio, se ni havus vokalon inter a kaj o (angla a en all). Tio estus malzorgemega. La lasta ebla sono iŭ ne uziĝas sed taŭgus tiel bone kiel uj se ĝia uzo bezoniĝus.

Nenia diftongo povas elparoliĝi (aŭ kantiĝi) sen glitado de l'voĉo. Tial se iu el ili formas unu silabon, ĉiu faras nur unu. Sendubege ni akceptu la francan metodon koncerne elparolo. Sed mi ne povas konsenti la opinion, ke oni



devas kalkuli ilin po du silaboj. Kial ne nomi ilin "diftongaj silaboj?"

Mi opinias ke ŝo egalvere kun jo estas konsonanto. Kiel j estas altilanga au "supra" sonanto komparinda kun la spira h kiel ĵ kun ŝ; tiel ŭ estas lipa aŭ "fronta" sonanto komparinda kun la angla spira "wh" kiel v kun f aŭ z kun s. Mi ne povas kompreni kiel iu ajn nacio trovas multe pli malfacile lerni elparoli "la w angla" ol la "j latina." Ŭo estas je u ĝuste kio jo estas je i: ili estas la finiĝoj de la vokalo vico. Alprenante komparon el la matematiko, j estas limo de neniganta aŭ mallongiĝanta i, kaj ŭ estas limo de simila u. La vokalo estas *variante* konverĝanta al konstanta konsonanto. Sen tia ĉi ĝusteco, j estas obstrukta i; kaj ŭ, obstruk-

cata u. La fremdulo diru a-e-i-j-aeijaeija kaj a-o-u-ŭ-ouŭaouŭa! li pasu de "laŭ" al "laŭe" kiel de "maj-" al "majo."

Ŭo rigardata kiel vokalo kaj kiel konsonanto, starante mano kun mano, ŝajnas taŭga simbolo de la duobla uzo kiun la literoj tiujn ĉi sonojn reprezentantaj havas en ĉiuj lingvoj. La gloro de esperantaj sonoj estas iliaj diftongoj. Sinjoro Ledger, kiu alfaris fonografion al Esperanto, diras; "Doktoro Zamenhof devas rangiĝi unu el la plej grandaj fonetikistoj de niaj tempoj." Se la majstro mem falas en la germanan elparolon de aŭ kaj eŭ kunparolante kun Sinjoro Borel, kiel oftege ni falas en la anglajn sonojn i, oy kaj ow, tiu fakto ne devas sin enmeti en nian teorion priskribon de diftonga strukturo.

## PAROLO DE SRO. DE BEAUFRONT

Ĉe la festo de la dudeka datreveno de la publika apero de Esperanto.

(*El l'Esperantiste.*)

Se, antaŭ dudek jaroj, en la tago samdata kiel hodiaŭ oni estus demandinta la plej bone informitan homon de l'tero pri la novaĵo okazanta sur ĝi, li kredeble estus respondinta: "Nenio nova okazas, laŭ mia kono." Se, pli precizigante, oni estus aldoninta: "Ni aludas la interkompreniĝon de l'popoloj," li certe estus grande malferminta la okulojn aŭ rideginta je l'vizaĝo de l'demandinto. Kaj tamen en tiu tago produktiĝis en la mondo unu el la plej rimarkindaj faktoj, kiuj markis iam la historion de nia homaro. En tiu tago ja, naskiĝis al ĝi lingvo por esprimi libere ne sole la ideojn, la sentojn, la dezirojn certe tre naturajn kaj tre rajtohavajn de la familo, de l'klano kaj de l'nacio, sed ankaŭ la ideojn, la sentojn, le dezirojn ne malpli naturajn, ne malpli rajtohavajn de ĝia homara frateco certigata, proklamata tiel same de la scienco, kiel de la religio. En tiu tago, ĝi, duonmutulo de multaj centjaroj, fine retrovis la plenuzon de l'parolo, kaj niaj materiaj progresoj ricevis sian necesan, sian fatalan plenigon.

Ĉar, karaj amikoj, ni festas kune la dudekan datrevenon de l'ambaŭ faktoj, ni ne povas apartigi de ili la viron, al kies serĉado, longaj laboroj kaj suferado oni ŝuldas ilin. Mi do levas mian glason kaj en via nomo, en la nomo de ĉiuj Francaj Esperantistoj, en la nomo de ĉiuj infanoj, kiujn Francujo naskis

al Esperanto, mi trinkas je l'sano de D<sup>ro</sup> Zamenhof kaj tutkore krias: vivu li, longe, longege vivadu li!

En la tri lastaj jaroj, kiel vi kredeble scias, ekster provo por revivigi la lingvon latinan, provo restinta sur la teoria kampo, tri sistemoj sin prezentis al la mondo kiel pli bonajn ol Esperanto. Ilin ekzameni tie ĉi estus afero tute senutila kaj neĝustaloka. Por ilin juĝi en ilia esenco mem, sufiĉas diri, ke ĉiuj tri celas pli-malpli la tujan kompreneblecon por novlatinuloj aŭ kleruloj edukitaj latine. Kiel l'*Esperantiste* diris en februaro, iliaj aŭtoroj senkonscie prezentas al la mondo realan tromplogilon; la estonteco pruvos tion ĉi. Sed ili multe klopodas; mi devas ne kaŝi al vi la aferon kaj eĉ altiri al ĝi vian plej seriozan atenton. Tial mi uzas por tio la naturan okazon de nia kunveno. Per la tromplogilo, kiun ili prezentas sincerkrede, mi opinias, ili reale erarigas homojn, kiuj venus al ni kaj eble ne venos plu, ĉar ili estos akceptintaj eraron kiel la veron. Mi eĉ timas,—kial ni tion kaŝus?—ke ili sukcesos varbi kelkajn rekrutojn eĉ en la esperantistaj vicoj, dank'al la trompanta logiluzio de tiu komprenebleco pli tuja sen la helpo de vortaro. Ni estu nek maltrankvilaj nek mirigita pro tio, sed ni maldormu kaj disdonu ĉirkaŭ ni la dekkvinentiman broŝureton. "Tre bela tromplogilo," kiu montras la esencan malbonaĵon de tiuj

tre bonintencaj sed erarhavaj sistemoj. Iliaj organoj bedaŭrinde ne estas iafoje afablaj, nek ĝentilaj por Esperanto kaj la Esperantistoj. Legante ilin, oni povus juĝi nin malamikoj de la helpa lingvo, pro ilia malafableco al ni. Iliaj verkantoj forgesas, ke sen la laborado kaj batalado de l'Esperantistoj, kiuj alkondukis al sukceso ĉi tiun ideon kaj pruvis ĝian eblecon praktikan, ili eĉ ne kuraĝus paroli pri ĝi hodiaŭ. Ili havis malpli da braveco, eĉ antaŭ kvin jaroj, kaj neniam, kiam ni relevis la standardon falintan kaj tute falintan de la helpa lingvo, en la jaro milokcent-okdekoka, post la senkreditiĝo de Volapuk.\* Partianoj kun ni de la sama ideo, ili povus, ili devus esti almenaŭ ĝentilaj por la homoj, kiuj preparis la vojon al ili. Ĉiusupoze, ni, ni restu ĝentilaj kaj sen malamoro. Ni montru ilian eraron, ĉar tio ĉi estas necesa; ni kiel eble plej multe ilin malhelpu erarigi homojn ne bone informitajn, sed ni ne imitu ilin: ni restu ĝentilaj kaj pretaj por ilin akcepti afable, kiam ili estos perdintaj sian iluzion.

Atendante tiun tagon, kiu venos certe kaj neeviteble, ni al ili diros tion ĉi: "Se Esperanto eble havas kelkajn malfortojn, ĉar el siaj principoj ĝi ankoraŭ ne tiris ĉion, kion ili povas doni, ĝi almenaŭ alportis ĝustan solvon pri la fundo de l'demando kaj pri preskaŭ ĉiuj detaloj, solvon, kiu ebligis al ĝiaj adeptoj, eĉ al malkleraj, produkti verkaron bonan kaj mirindan sen alia lernado, ol tiu de l'sistemo. Vi, kontraŭe, ŝajnan kaj trompantan solvon alportas, ĉar tuj kiam vi ne prezentas plu vian verkon al novlatinuloj aŭ kleruloj, ĝia

bela komprenebleco forflugas, kaj tiam Esperanto aperas kiel senkompare pli klara kaj pli facile komprenebla. Sed ni do kalkulu la novlatinulojn, ni kalkulu la klerulojn en la mondo, kaj kontraŭ ilin ni metu la ceteron de l'homoj tiel egale bezonantaj lingvon internacian kiel la unuaj kaj eĉ multe pli; tiam klare vidiĝos, ke via solvo estas erara, ĉar ilin ĝi ne povas atingi. Tio ĉi estas la vera kampo por komparo, la kampo sur kiun oni devas meti la demandon kaj ĝin ekzameni tutfunde. Plie, ĉar *kompreni* estas nur la unua paŝo en ia lingvo, ni atendas konfide kaj sentime por Esperanto kiel viaj adeptoj, eĉ la kleraj, procedos por la dua, ni volas diri, por la verkado kaj precipe por la parolado en via lingvo. Jes, ni konfide kaj tute sentime via atendas sur tiu ĉi grado, ĉar sur ĝi vi nepre vidos, ke malgraŭ la malfortoj, kiujn vi trovas en Esperanto, malfortoj korekteblaj, se vere ili ekzistas, malgraŭ ĉio Esperanto havas la ĝustan solvon dum vi havas la malĝustan."

Konfidante en la estonteco, certaj, ke Esperanto estas en la vero pri la esencaj principoj de la helpa lingvo, kuraĝigite de la ĝisnunaj sukcesoj kaj ankoraŭ pli stimulate de la restanta farota laboro, ni energiege daŭrigu la bataladon, kun la okuloj obstine turnitaj al la celo, kaj, por ne lasi la kuraĝon fali, ni kantu kun Zamenhof en la irado:

Forte ni staru, fratoj amataj,

Por nia sankta afero!

Ni bataladu kune tenataj

Per unu bela espero!

## PUBLIKAJ ESPERANTO-OFICOJ

Ni liveras tie ĉi kelkajn mallongajn informojn, kiuj, en sia loko, deziras krei Publikajn Esperanto-Oficojn. Kompreneble, tio estas nur ĝenerala plano, kiu, en la detaloj, aliĝos laŭ la lokaj cirkonstancoj; tamen, ni opinias, ke tuj kiam la ĉefaj jenaj punktoj estos realigitaj, montriĝos bonaj rezultatoj kaj estos praktika utilo por la publiko.

*Celo.*—Publika Esperanto-Ofico havas la celon utiligi Esperanton al la neesperantista publiko kaj esti praktika perilo por la personoj, kiuj, kvankam neesperantistoj, deziras uzi nian lingvon por siaj internaciaj rilatoj. *Ĝi diferencigas de la konsulo, en tio, ke ĝi ĉefe celas la neesperantistojn, dum la unua celas alporti utilon al la esperantistoj mem.* Ĝi havas proksimume tiun saman rolon kiel la publikaj telefonejoj, kiujn povas uzi la personoj, kiuj

ne abonas telefonon. Nerekte, la Esperanto-Oficoj montros per faktoj, ke Esperanto jam nun liveras praktikajn rezultatojn kaj ŝatindan utilon; ili helpas al la enkonduko de Esperanto ĉe la komercistojn, hotelistojn, k. t. p. kaj tiel faciligos la praktikan uzatecon de nia lingvo.

*Organizo.*—Esperanto-Ofico povas kreiĝi en ĉiu loko, kie estas almenaŭ unu esperantisto. Ne estas necese, ke ekzistu antaŭe ia grupo jam fondita. Sekve, en la multaj lokoj, kie estas izolaj esperantistoj, Esp.-Ofico tre bone povas esti starigata. Tio eĉ povos havi bonan influon sur la propagandon de nia lingvo en ia urbo kie Esperanto estas ne jam konata, ĉar tia Ofico altiros la personojn per praktikaj, jam ricevitaj, rezultatoj.

Esp.-Ofico povas esti kunigata en la sama ejo kiel la konsulo kaj prizorgata de la sama persono, *ĉar, en la komenco, la laboro estas ne granda*. Nur kiam la aferoj estos sufiĉe gravaj, oni povos apartigi la Konsulon kaj Oficon kaj komisii ilian gvidadon al diversaj personoj, kiuj dividos la taskon inter si. En la grandaj urboj povas kreiĝi Esp.-Ofico en ĉiu grava kvartalo, se la bezono tion montras.

*Laboro.*—La Esp.-Ofico konigos sian fondiĝon per cirkuleroj dissendotaj: 1. Al la lokaj gazetoj kun peto pri raporto. 2. Al la komercistoj, almenaŭ la plej gravaj. 3. Al la hotelistoj, kaj entute al ĉiuj personoj kaj grupoj, kiuj povas iel uzi la Esp.-Oficon.

Per tiu cirkulero, la Esp.-Ofico sciigos, ke:

1. Ĝi tradukos senpage kaj kiel eble plej akurate en Esperanton ĉiujn prezarojn, cirkulerojn, reklamilojn, gvidlibrojn, k. t. p., kiujn oni sendos al ĝi.

2. Ĝi elmontras, komunikos kaj disdonos ĉiujn esperante skribitajn cirkulerojn, reklamilojn, k. t. p. al la esperantistoj de sia urbo kaj ankaŭ ilin dissendos al ĉiuj aliaj Esp.-Oficoj por afiŝado kaj disdonado, laŭ peto.

3. Ĝi, laŭ peto, tradukos nacien tiujn ĉi prospektojn al la neesperantistoj de sia urbo.

4. Ĝi kiel eble plej klopodos por konigi al la publiko pri kiuj aferoj ĝi ricevis informojn per esperantaj cirkuleroj, k. t. p., kaj pri kiuj ĝi sekve povas liveri precizajn informojn.

5. Ĝi tradukos senpage el Esperanto en nacian lingvon, aŭ reciproke el nacia lingvo Esperanten ĉiujn leterojn kaj korespondaĵojn, kiujn ricevos la komercistoj, hotelistoj, kaj tion faros kiel eble plej akurate tiamaniere ke ĉiu persono povos skribi esperante al ia ajn komerca firmo de la loko, kie estas Esp.-Ofico kaj ricevi ankaŭ esperantan respondon. Ankaŭ la komercistoj povos komuniki esperante kun alilingvaj esperantistoj per la Esp.-Ofico, kiu tradukos la korespondaĵojn.

6. Ĝi entute estas preta por servi al ĉiuj personoj, kiuj deziras uzi Esperanton por sia utilo kaj por tio konstante interrilatos kun la aliaj Esp.-Oficoj en la mondo.

Tiuj ĉi servoj estas *senpage farataj* (esceptante la poŝtelspezojn).

Ni konsilas ke kune kun la cirkulero al la komercistoj, oni kunsendu tute pretan respondilon, kiu montras, ke la komercisto, hotelisto, k. t. p., notis la fakton kaj sekve akceptas korespondi esperante *per* la Esp.-Oficoj. Tio ĉi estos eventuale tre utila por la publikigo de Komerca Jarlibro Esperantista aŭ

nur simpla nomaro de la firmoj, kiuj korespondas esperante (per la Esp.-Of.).

*Ejo.*—Estas tre necese, ke la Ofico havu publikan ejon ĉe kiu povas sin turni ĉiuj petantoj pri sciigoj. Tiu ejo estas ĝenerale la sama kiel la konsulejo. Oni por tio povas aranĝi la aferon laŭ la jena maniero:

Proponi al ia komercisto (prefere al libristo, ĵurnalvendisto, k. t. p.), kies magazeno sidas sur centra kaj tre vizitata strato, ke li cedu parton de sia montra fenestrego por la afiŝado de la sciigoj de la Ofico kaj Konsulo.

Tiu afiŝejo, kiu en la komenco estos malgranda, enhavos: 1. Ĉiujn avizojn de la Konsulo kaj Ofico al la publiko esperantista aŭ ne. 2. La avizojn de la personoj kiuj deziras uzi la servojn de la Esp.-Of. 3. La komercajn cirkulerojn kaj prospektojn esperante redaktitajn. 4. La avizojn pri la ĝenerala movado esp.: kursoj, libroj, ĵurnaloj, k. t. p.

*Tiu loko povas esti cedata senpage eĉ se la komercisto estas neesperantisto, ĉar ekzemple, libristo tiel ricevos multajn aĉetantojn de esperantaj libroj, kaj li de tio ricevos profiton multe pli gravan ol la malgranda parto de sia montra fenestrego kiun li donos por tio.* Komprenoble, se la komercisto estas mem esperantisto la loko provos esti pli grava, kaj oni provos altiri la atenton pentrante la vorton Esperanto aŭ per aliaj manieroj. Aliparte, la fakto, ke la tenisto esperante parolas estas grava. Oni do sin turnu prefere al esperantistaj komercistoj por la afiŝejo, sed tamen tio ne estas nepre necesa. La rezultatoj de tia videbla ejo en ĉiuj lokoj, kie ĝi estis farita, montriĝis bonegaj.

*Komuna adreso.*—Por simpligi la interkomunikojn inter la Oficoj, aŭ inter la Oficoj kaj la personoj, kiuj deziras uzi iliajn servojn, ni rekomendas, ke ili alprenu simplan adreson: *Esperanto-Ofico, en X (nomo de l'urbo), sen necesa cito de l'strato. Por tio, sufiĉas sciigi la poŝtoŝicejon.* Tiu simpla adreso evitos por la korespondado longajn kaj ofte vanajn serĉojn en la jarlibroj aŭ gazetoj, aliparte tre faciligos la taskon de la personoj, kiuj bezonas la Esp.-Oficon.

*Komuna ĵurnalo.*—Estas tre utile, se la Esperanto-Oficoj de la tuta mondo povas komuniki inter si per sama komuna gazeto, kaj povas enpresi en ĝin siajn komunikojn kaj avizojn. **ESPERANTO-ĴURNALO estas la** komuna organo de la Oficoj kaj Konsuloj; kontraŭ jara helpabono de 10 frankoj (\$2.00), ĝi liveras al ĉiuj oficoj kaj konsuloj ŝatindajn sciigojn kiuj koncernas la konsulojn kaj oficojn.

*Financaj rimedoj.*—La elspezoj de la Ofico estas malgravaj, ĉar la poŝtmarkoj estas pagataj de la uzantoj mem; restas nur la elspezoj por la dissendo kaj presigo de la cirkulero, kiu konigas la kreon de la Ofico. Tiuj elspezoj negrandaj povas esti pagataj de la loka grupo, se estas unu, ĉar Esp.-Ofico nerekte tre helpas al la propagando, aŭ de privata iniciativo. Tuj kiam la Oficoj ekservos, ili kredeble ricevos monhelpojn de la komercistoj aŭ de la societoj, al kiuj ili servas. Se la laboro fariĝas tre grava, tiam kaj nur tiam, oni povos difini prezojn por la servoj.

We heartily recommend the establishment of the above described "Publikaj Esperanto-Oficoj." These complete what was lacking in the Consul: the Consul is the intermediary between Esperantists, the Publika Oficoj that between Esperantists and the general public. Every group should appoint a Consul at least. If possible, let him be a business man, and he certainly should be able to read and write Esperanto somewhat fluently. Every group should also subscribe to *Esperanto*, 8 rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland. It appears twice a month, costs only 60 cents a year, and is the official journal of the "consuls." It is, in fact, *the Esperanto newspaper*.

## TUTMONDA VORTARO ESPERANTA

Al la Redaktoro:

La esperantistaro mankas, bezonas, postulas, deziras, kaj, kredeble, uzos novan, plenigan vortaron, presigotan nur esperante, kaj enhavotani difinojn de ĉiu vorto aŭ almenaŭ de ĉiu radikoj, kune kun la deveno de ĝi.

Tia libro (eble ilustrata) devigus ĉiujn esperantistojn *pensi* esperante, kaj ĝi, tial, treege faciligus la ĉiutagan aŭ komunan uzadon de nia lingvo. Ankaŭ, tio libro treege

"Vi estas prava, esperanta vortaro en Esperanto estas tre bezonata kaj, ni ĝojas diri, estas nun en preparado. La verkisto estas unu el la plej spertaj Esperantistoj, kaj do ni esperas baldaŭ ricevi tiun utilan helpon."—*(September Brita Esperantisto.)*

**Esperantista Kantaro.** Kolekto unua: Germanaj popolaj kaj studentaj kantoj. Esperantigitaj de L. E. Meier. Esperanta Eldonejo Hans Th. Hoffman, Berlin. (Price 30 cents.)

Most Esperantists acknowledge the influence of song and feel the want of a collection of songs for use in their meetings. We know of one club that makes shift with typewritten copies of songs translated by "Samideanoj."

Still, we cannot accept as a general truth the German proverb,

Where song resounds, the passions keep away,  
For among evil men song bears not sway.

Song does not always soothe our passions, but sometimes has a powerful influence for the very reason that it arouses them either for good or evil.

We, therefore, endorse the above booklet

helpus elmontri ke la lingvo Esperanto, jam posedanta ĝian propran literaturon, estas vere atinginta la tempon kiam ĝia propra vortaro, por tutmonda uzo, estas tre necesa. Ni esperu ke la tempo ne estas tre malproksima kiam oni entreprenos la taskon supre proponatan. Multege da ekzempleroj de la libro projektota certe devus vendiĝi.

EUGENE F. M. PIKE, Esp. No. 14,975.

*Complete English-Esperanto Dictionary.*—This important book, at which Mr. Rhodes has been working for several years, is not yet ready. The publishers hope to have it ready next May or June; but whether it will really see the light of day then we are wholly unable to say.

only with restriction. *The second part contains a number of German folk-songs worthy of being adopted*, and in the other two parts there are some unobjectionable songs. But most of these songs of love and of wine and beer do not help to make the soul free and to arouse enthusiasm for the beautiful and good. The love praised in some of them is not the pure spark of heaven; some do not praise wine and beer as good gifts to be used moderately, but invite intemperance. We earnestly hope that songs of such tendency will not find favor with the students of American universities.

The translation, a not very easy task, renders the original correctly, and the Esperanto is good, as was to be expected of a writer of M. Meier's known versatility.

A. K.

## LA VERDA "KANGARUO" AŬ DIDELFO

Originala verko de Wren J. Grinstead, Richmond, Ky.

(daŭrata)

La Kangaruo nun diris nenion, kaj li ankaŭ ne saltis; sed li ŝajnis eĉ pli kolera ol iam.

"Ĉu ŝi efektive kantis tion?" li diris per tre, tre kolera voĉo.

"Jes," diris Ĉikorio, kaj ekĝemetis mallaŭte: "Ho mi bedaŭrinde, mi volas, ke mi ne estu parolinta pri ĝi!"

"Nu, knabin'!" subite ekkriegis la Kangaruo, ree saltante. "Mi estas ŝia fianĉo! Si ne havas la rajton tiel kanti!"

Ĉikorio larĝe malfermis la okulojn dum minuto, kaj tiam diris:

"Mi ne kolerus, se mi estus vi. Certe ŝi ne intencis ion per ĝi."

"Eble ne, sed kion do ŝi intencis?" diris la Kangaruo.

Tio ĉi estis tro malfacila demando por Ĉikorio. Ŝi do ne penis respondi al ĝi; ŝi nur silentadis. Post kelke da tempo la Kangaruo diris:

"Nu, mi supozas ke mi devos fari interparoleton kun Fraŭlino Fonjo pri tio. Sed venu—ni demandu ĉe la Lunviro pri la verda fromaĝo."

Ili do iradis iom da tempo sen parolado. La Kangaruo tiel sulkigis la frunton, ke Ĉikorio bezonis sian tutan spiron, por kun li kunkuri. Fine li haltigis antaŭ malgranda triangula papera domo, ĉirkau tiel larĝa kiel kuvo. Ĉikorio pensis, ke li estas sonorigonta, sed ne—li sidis sur la voston, kaj atendis, kvazaŭ aŭskultante. Preskaŭ tuj ekvokis voĉo interne:

"Tomĉjo, ĉu vi postenigis la montrilojn de la horloĝo hodiaŭ vespere?"

La voĉo de Tomĉjo tiel sonis, kvazaŭ li estus en la kelo, dirante:

"Jes, Sinjoro."

Unu el la paperaj muroj de l'domo moviĝis malsupren, simile al fenestro malfermanta, kaj viro elmetis la kapon kaj klinis sin al Onklo Bob. La Kangaruo salutis profundege, kaj Ĉikorio divenis la subpenŝaĵon, kaj faris sian plej bonan virinklinon. Ŝajne plaĉis al la Lunviro.

"Tiu horloĝo estas la malbono de mia ekzisto," li diris. "Mi devas ĝiajn montrilojn postenigi ĉiutage vespere; kaj de tiam kiam mi havas Tomĉjon Tiddledywinks por tion observi, mi devas krome zorgi, ke li tiel faru."

"Ĉu estis tial, kial vi tro frue venis al tero, je tiu tempo?" diris Onklo Bob.

"Jen ĝuste kial," diris la Lunviro. "Atendu momenton, kaj mi ĝin diros al vi."

"Ĉi via reŭmatismo ne vin tiel suferigas ke vi ne povas foriri?" demandis la Kangaruo, tre ĝentile.

"Ho ne," diris la Lunviro. "Mi tre bone sanas hodiaŭ." Li levis la paperan muron, kaj Ĉikorio aŭdis lin movante la meblaron interne. Onklo Bob sin turnis al Ĉikorio kaj diris:

"Eble vi povos demandi de li kion ajn vi deziras, Ĉikorio. Li ne estas koleretema hodiaŭ. Zorgu tamen ke vi ne diru ion pri la ĝibeto sur lia mentono."

Guste tiam la Lunviro preterpasis la angulon de l'domo. Li estis nudpieda, portis tolan noktoveston kaj "panaman" ĉapelon, kaj sin fortege ventumis per granda japana ventumilo. Se Ĉikorio povus vidi nur liajn krurojn, ŝi pensus ke li prezentas al ŝi la dorson, ĉar liaj genuoj sin fleksis posten kaj liaj piedfingroj staris malantaŭen. Lia vizaĝo tamen estis korekte antaŭa. Tio, kion estis dirinta Onklo Bob, kaŭzis ke Ĉikorio rigardis zorge lian mentonon, kie ŝi vidis grandan verdan ĝibeton, kiu similis naskiĝ-makuleton. Ĉikorio ne povis deteni la okulojn de tiu ĉi ĝibeto, kaj ŝi timis dum la tuta tempo, ke la Lunviro trovos ŝin ja rigardantan ĝin. Sed unue li nur rigardis ŝin atente, kaj tiam komencis paroli al Onklo Bob.

"Nu, okazis tiel," li diris. "Mi estis invitita al temanĝo ĉe Norwich je la kvina horo. Mi sciis, ke mi ne tute devas alveni antaŭtempe, ĉar mi neniam povis toleri la varmon, vi komprenas. Nu, tiu enuigema horloĝo estis unu horon antaŭtempe, kaj mi ne sciis la fakton, ĉar la afereto ĵus estis sendita el la horloĝejo; tial mi alvenis al tero unu horon antaŭtempe—meze de l'posttagmezo, meze de l'somero. meze de dudekhektara pajrestafa kampo. Varmege! Ja—mi ne volas iam vidi pli! Tial, for en mi ekrisi l'aplej malvarman direkton—kiu kompreneble estas norden. Mi tamen forgesis, ke miaj genuoj estis tute torditaj per la reŭmatismo, kaj antaŭ ol mi eksciis tion, mi trovis min ja iranta suden tiel rapide, ke ĉiu opiniadis, ke mi certe ĉasas ciklonon. Mi baldaŭ tro varmiĝis per tiu

paŝado, tial mi haltis ĉe farmdomo, kaj petis ĉe la bonvirino ke ŝi donu al mi ian manĝaĵon aŭ trinkaĵon—ian *malvarmegan*. Ŝi alportis al mi pelvon da io kiu, ŝi diris, estis malvarma pizsupo. Mi faris mordegon el ĝi, kaj ĝi estis tiel varmega ke ĝi forbruligis la tutan haŭton de mia lango. Mi vivas de tiam per glaciaĵo krema kaj figa, kaj mi havas nenian meblon en mia domo krom nura glacio; sed mi ne ankoraŭ estas malvarmiĝinta.”

“Ni tre dankas al vi la rakonteton,” diris Onklo Bob. “Jen fraŭlineto, kiu estas tien ĉi de tero veninta nur por havigi iom da verda fromaĝo por la temanĝo. Ĉu ni povos iom provizi por ŝi?”

La Lunviro tre rigardegis Ĉikorion. “Verda fromaĝo por la temanĝo, ĉu ĝi estis tiel, aŭ verda teo por la fromaĝmanĝo?” li diris.

Ĉikorio ŝanceliĝis. “Verda fromaĝo por la temanĝo, mi pensas,” ŝi diris.

“Ni do devos malkontentigi vin,” diris la Lunviro. “Ne estas eĉ unu unco da ĝi en la tuta luno, en tiu ĉi sezono.”

Ĉikorio certe ŝajnis tute malkontentega. “Mi pensis, ke la luno estis farita el verda fromaĝo,” ŝi diris malforte.

“Jes tute, jes tute,” diris la Lunviro. “Ĝi fariĝis el verda fromaĝo, kaj fariĝas nove ĉiukvarsemajne. Sed tuj kiam ĝi pleniĝis, la Granda Urso kaj la Hundstelo ekmordetas ĝin, kaj antaŭ ol ni ekscias, ili jam estas ĝin tute formanĝintaj krom la ŝelo. Tiam ni devas rekomenci kaj ĝin tute refari.”

Ĉikorio ekĝemetis kaj pensadis dum minuto. Tiam ŝi paroletis al Onklo Bob:

“Se plaĉas al vi, ĉu mi povas de li demandi kion li havas por trinki?”

Sed la Lunviro sendube aŭdis, ĉar li parolis tuj:

“Verdan teon, kompreneble. Se vi nur dezirus verdan teon por la fromaĝmanĝo, ni povus doni al vi tiom, kiom vi povus forporti. Bob, ĉu vi ne povas montri al tu ĉi fraŭlineto, el kie ni eltiras nian teon?”

“Certe mi povas,” diris Bob. Tiam li aldonis timeme: “Pardonu al mi, Sinjoro, sed ĉu vi konas iun fraŭlinon, nome Fono Grafo?”

“Fono Grafo?” diris la Lunviro dubeme. “Fono? Neniam aŭdis la nomon. Ĉu parenca al Para’ Grafo?”

“Ne laŭ mia scio,” diris la Kangaruo. “Ĉu vi estas certe ke vi neniam aŭdis pri ŝi?”

“Neniam,” diris la Lunviro. “Mi ne pretendas konon de tiuj homoj sube sur la tero, esceptinte kiam ili estas tiel ĝentilaj ke ili min vizitas, kiel faris tiu ĉi fraŭlineto.”

Ĉikorio ruĝiĝis kaj kulpe rigardis malsupren, ĉar ŝi estis tre malĝentile, pro sia tioma rigardado de la verda ĝibeto sur la mentono de la Lunviro. “Mi miras, por kio ĝi estas!” ŝi pensadis.

Sed la Kangaruo paroladis. “Ĝi certe estas eraro. Mi pensas, ke mi devos telefoni al la fraŭlino.”

“Kial vi rigardegas mian mentonon?” diris la Lunviro kolere al Ĉikorio. “Ĉu vi neniam vidis antaŭe sulketon?”

“Je—jes, Sinjoro,” balbutis Ĉikorio, “sed mi neniam vidis ver—tio estas—mi—mi tre dankas vin pro via rakonteto, kaj mi pensas, ke mi devas ekiri hejmen.”

“Ne tiel rapidu,” paroletis la Kangaruo. “Vi ne ankoraŭ vidis la lakon, kie ni havigas nian teon.” Tiam li diris laŭte al la Lunviro: “Ĉu la reŭmatismo ne denove doloras vin, Sinjoro?”

“Jes, mi kredas tiel,” diris la Lunviro, “kaj ĝi varmiĝas ankaŭ. Mi petas, ke vi min permesu foriri.” Kaj li komencis sin ventumi pli forte ol antaŭe, kaj malaperis post la papera dometo.

“Nun,” diris Onklo Bob al Ĉikorio, “se vi volos resti ĉe mia domo dum kelke da minutoj, ni venos kaj vidos la Te-maron.”

“Dankon,” diris Ĉikorio. “Ĉu ĝi estas granda kaj blua, simila je ia ajn maro?”

“Blua?” diris la Kangaruo. “Ne, certe ne. Ĉu vi ne aŭdis ke la Lunviro ĝin nomis *verda* teo? Ni devas meti ĝin en la fromaĝon ĉiuplenlune, por fari tiun verda, kaj se ĝi estus blua, ĝi ja ne taŭgus.”

“Kaj ĉu ĝi estas granda?” diris Ĉikorio.

“Tome,” diris la Kangaruo. “Ĝi estas en la Te-kruĉo, vi komprenas.”

“Ĝi ne povas esti do tre granda,” diris Ĉikorio.

“Atendu ĝis vi vidos la Te-kruĉon!” diris Onklo Bob, kun sciplena strabo.  
(daurota).



## AVENTURO DE PAUL LOUIS COURRIERS EN KALABRIO

LETERO AL SIA KUZINO

DE PROF. A. M. GRILLON, HON. PRES. PHILADELPHIA ESPERANTO SOCIETY

Unu tagon mi estis vojaĝanta en Kalabro, lando de malbonaj homoj, kiuj, mi kredas, neniu amas, kaj speciale ne ŝatas francojn: diri al vi la kaŭzon estus tro longe; sufiĉe, ke ili nin malamas ĝis morto, kaj ke oni tre malbone prosperas, falante inter ilin. Mia kunvojaĝanto estis junulo, kun vizaĝo simila al tiu de la sinjoro, kiun ni vidis je Rancey'o, ĉu vi memoras? Kaj eĉ pli stranga—mi ne diras tion por vin interesi, nur ĉar estas la vero.

En tiuj montoj la vojoj estas profundegaĵoj; niaj ĉevaloj malfacilege marŝis; mia kunvojaĝanto iris antaŭe. Vojeto kiu al li ŝajnis pli uzebla kaj pli mallonga nin trompiĝis—tio estis mia kulpo. Ĉu mi devis konfidi al dudekjara junulo? Ni serĉis la vojdon dum la tuta tago tra la arbaro, sed ju pli ni serĉadis des pli ni eraris, kaj estis jam profunda mallumo, kiam ni alvenis proksime al tre nigra domo. Ni eniris ne sen suspekto, sed kion por fari?

Tie, ni trovis grandan familion de karbistoj je tablo; ili tuj nin invitis al la manĝado. Mia kunulo ne bezonis duan inviton; jen ni estas, manĝante kaj trinkante, almenaŭ li; ĉar por mi, mi ekzamenis la mienon de niaj mastroj. Ili havis efektive mienon de karbistoj, sed la domo? Vi estus pensinta, ke estas vera armilejo; oni vidis nur pafilojn, glavojn, tranŝilojn kaj tranĉilegojn. Ĉio malplaĉis al mi, kaj mi ekvidis ankaŭ, ke mi ne plaĉas al la aliaj. Pri mia kunulo estis tute male; li estis unu el la familio; li ridis, li babilis, kaj pro mia nesingardemeco, kiun mi devis esti antaŭ vidinta, li diris unue el kie ni venis, kien ni iras, ke ni estas francoj. Imagu! ĉe niaj plej furiozaj malamikoj!—solaj—forlokitaj—tiom malproksimaj de ia ajn helpo. Kaj, por nenion forgesi el tio, kio povis nin perdi, li ŝajnis riĉulo, promesis al tiuj homoj ĉion, kion ili deziras. Fine li parolis pri sia valizo, petegante, ke oni tre zorgu pri ĝi, ke oni ĝin metu je ia litkapo; li ne volis, tiel li diris, alian kusenon.

Ha! juneco! Kiel kompatinda estas via aĝo! Oni krediske ni portis la diamantojn de lakrono.

Post la vespermanĝo, oni nin lasis solaj; niaj mastroj dormis malsupre, ni en la ĉambro super tiu, kie ni manĝis. Duona etaĝo je sep aŭ ok futoj kien oni atingis per manŝtuparo, jen estis la dormoĉambro kiu nin atendis; ia nesto, en kiu oni eniris, rampante sub traboj ŝarĝitaj per provizoj por la tuta jaro. Mia

kunulo tien supreniris sole, kuŝiĝis, kaj jam dormis kun la kapo sur la multvalora valizo. Mi decidis maldormi—mi ekbrulis bonan fajron kaj mi komencis trankviliĝi, kiam, je horo ŝajnanta al mi proksima al la tagiĝo, mi aŭdis malsupre niajn gemastrojn parolantaj kaj diskutantaj. Aŭskultante ĉe la kameno, mi klare aŭdis ĉi tiujn vortojn: Nu! fine! ĉu ni devas ilin ambaŭ mortigi? Al kio la edzino respondis, jes. Kaj mi nenion aŭdis plu. Kion mi diros al vi? Mi restis apenaŭ spirante. Mia tuta korpo tiel malvarma kiel marmoro. Vidante min, vi ne povus diri, ĉu mi estas viva aŭ morta.

Dio! Kiam mi pensas ankoraŭ pri tio! Ni ambaŭ, preskaŭ sen armiloj kontraŭ ili, dekdu aŭ dekkvin, kiuj havas tiom da ili! Kaj mia kunulo mortiĝinta per dormo, kaj laciĝo. Lin voki? Fari bruon? Mi ne maltimis. Forkuri? Sole? Mi ne povis. La fenestro ne estis malproksima de la tero, sed malsupre du grandaj hundoj bojadis kvazaŭ lupoj! En kia ĉagreno mi estis! Tion imagu, se vi povas.

Post kvarono da horo, kiu al mi ŝajnis longa tempo, mi ekaŭdis iun sur la ŝtuparo, kaj tra la fendaĵo de la pordo mi vidis la patron havantan lampon en unu mano; en la alia tranĉilegon. Li supreniris; sia edzino venis poste. Li lasis la lampon, kiun la edzino prenis; tiam li eniris nudpiede, kaj ŝi de ekstere diris al li mallaŭte, ŝirmante per ŝiaj fingroj la troon da lumaĵo de la lampo: "Senbrue! iru senbrue?" Kiam li atingis la liton. Tiu malfeliĉo junulo! Etendita! Oferanta sian malkovritan gorgon! Per unu mano li prenis sian tranĉilegon kaj per la alia. Ha! kuzino! Li ekkaptis ŝinkon pendantan el plafono, tranĉis de ĝi pecon, kaj foriris tiel, kiel li estis veninta. La pordo fermiĝis, la lampo foriĝis, kaj mi restis sola kun miaj antaŭaj pensoj.

Kiam taglumo aperis, la tuta familio kun granda bruo venis por nin veki kiel ni jam petis. Oni alportis mangajojn, oni servis matenmanĝon tre puran, tre bonan. Du rostitaj kokidoj tie estis. Unu, diris la mastrino, por tuj manĝi, la alia por forporti. Tion vidante, mi ekkomprenis fine la signifon de tiuj terurigaj vortoj: "Ĉu ni devas ilin ambaŭ mortigi?"

Kaj mi kredas ke vi havas, kara kuzino, suficon da spriteco por diveni tion, kion tio signifis.

## KRONIKETO

**The Third Esperanto Congress** with 32 photographic illustrations, British Esperanto Assn., 13 Arundel St., Strand, London, W. C. Price, 20 cents in U. S. postage stamps. This is just what you want in order to find out what the Congress did. Every local Esperanto club should send for several copies.

**The Illinois Esperanto Association** was formed July 27, 1907, representatives from the following Illinois E. Societies being present: Chicago E. Society, University of C. E. Society, Elgin E. Group, Rockford E. Society, E. Club of R. (Swedish), "La Juna Stelaro," the Forest City E. Club. Officers were elected and work planned for the fall. It was decided to hold a convention of all Esperanto societies of the State, at Elgin, some time in October.

During the past month the Association has answered some two hundred inquiries concerning it, has sold Esperanto literature, maintained a correspondence study department with considerable and growing success, secured representatives in many cities, started Esperanto clubs in many cities, such as North Chicago, Sterling, Rochelle, Dixon, and elsewhere. Mr. Hardin has also planned to lecture in many places this fall.

Our desire is to help the A. E. A. all we can, as well as to aid other State Associations. We will affiliate with the A. E. A. at once.

Yours for Esperanto,

E. C. REED, Secretary.

Pres.—Floyd B. Hardin, Hon. Pres. Uni. of Chicago C. E. S.

V.-P.—Dr. Walter H. Fox, Pres. Chicago Esperanto Society.

Treas.—Dr. Clara L. Todson, Pres. Elgin Esp. Soc.

Sec'y.—Edwin C. Reed, Pres. Rockford Esp. Soc., Ashton Block, Rockford, Ill.

Seattle, Wash., is the headquarters not only of the largest Western "grupo," but of a flourishing society which seeks to unite collectors—of stamps, coins, etc.—throughout the world by means of Esperanto. The society, *The Esperanto Speaking Collectors of the World*, entered upon its third year in July, and at that time selected as its official journal the "Chicago Collectors' Monthly." Members of this enterprising body may be found in France, Germany, Mexico, Venezuela, India,

and throughout America; and it can be seen that opportunities for exchange, correspondence, etc., are extensive. Julian Park is the secretary for this country, and the International Secretary is Wm. G. Adams, 309 27th Ave., S., Seattle. The annual dues are but 75 cents.

La unua kunveno de la *Toronta Klubo Esperanta* okazis la 21an de Septembro kiam ĉirkaŭ 25 klubanoj de lasta jaro kune kun 25 sciemuloj kunvenis en "Beacon Hall, Forum Building." Kurso formiĝis kiu komenciĝos la plej proksiman sabaton kiam la klubo atendas almenaŭ 25 lernantojn komenci la studadon.

La prezidanto instruos la tutan klason dum la unua duonhoru de la kunvenoj post kiu la klaso rompiĝos en grupetojn kiujn instruos la anoj de lastjara klubo dum unu horu kaj tiam estos duonhoru da interparolado.

La glora firmo de Vannevar kaj Kompanio nun vendas Esperantajn librojn kaj havas je la ekstero de sia magazeno, grandan surskribajon anoncantan la vendon. Tiu ĉi firmo estas fama pro iliaj kolegiaj kaj universitataj libroj.

Ni atendas grandan sukceson en Toronto tiun ĉi vintron kaj esperas povi havi du klasojn antaŭ la printempo. Ni esperas povi kunvenigi la geinstruistojn de Toronto por interesigi ilin antaŭ ne longe.

ROBERT M. SANGSTER, Prezidanto.

**Phillipine Islands. The Far Eastern Review**, a splendid illustrated magazine of commerce, industry, and engineering, the publication office of which is in Manila, has become interested in Esperanto. Two columns are given in its August number to a second lesson in Esperanto.

We have, moreover, great pleasure in announcing the foundation of the Filipina Esperantista Societo, and the appearance of a new Esperanto magazine—*La Filipina Esperantisto*. The first number presents a very attractive appearance, and should certainly gain adherents for our "afero" in Southeastern Asia. Ni gratulas niajn Filipinajn samideanojn pri la rezultatoj de ilia energio kaj laborado.

**Ireland. The Belfast Daily News.** Sept. 26, informs us that Professor Macloskie, of Princeton University, is continuing in Ireland the propaganda work for Esperanto, which he began here in the United States a year ago.



## HUMORAĴOJ

“RIDU, KAJ LA MONDO RIDAS KUN VI.”

### ZORGEMA INFANO

Kiam alvenis Vilĉjo por viziti ĉe sia avino, tre interesadis lin ĉio, kio okazis en la kuirejo. Foje diris al li la avino: “Mi faros por vi etan bongustan pasteĉon en telereto, tute por vi mem. Ĉu vi ne pensas, ke mi estas tre bona, tion ĉi farante?”

Vilĉjo iomete pripensadis, kaj fine li diris: “Alvinjo, panjo precipe ordonis, ke mi ne estu malhelpema dum mi estas ĉe vi. Se ĝi iel vin helpus, estus tute egale al mi, ke vi faru mian pasteĉon laŭ kutima grandeco.”

W. J. P.

### GRAVA KONSILLO

Irlandano skribis al sia filo: “Mia kara junulo; neniam prokrastu ĝis morgaŭ tion kion vi estas farinta hodiaŭ.”

A. K.

### TUTE SENDANĜERA

“Rapidu, sinjorino Mulligan! Via domo brulas; estas danĝero ke ĝi tute forbrulos.”

“Mi scias pli bone, vi sentaŭgulo! Vi ne povas min trompi. La pordo estas ŝlosita, kaj mi havas la ŝlosilon en mia poŝo!”

A. K.

### INSTRUKCIOJ

Unu virino diris al hundvendisto antaŭ kelkaj tagoj ke ŝi aĉetos hundidon se li povos doni al ŝi ian portilaĵon.

La viro montris al ŝi skatoleton, sed ŝi diris: “Estas tro malgranda; la kompatinda etaĵo ne povas sin turni en ĝi.”

“Sed, sinjorino,” diris la vendisto, “vi povos ĉirkaŭturni la tutan skatoleton.”

Ŝi aĉetis la hundidon kaj kontente eliris.

ERNEST F. DOW.

### AFERO DE MALKUNMETO

La oratoro estis videble embarasata; kaj la ridetoj de la aŭdantaro lin malkvietigis. Sed li estis tute fervora, kvankam li vage paroladis. Priparolante poste pri la kunveno, aŭdinto ekdiris, “Tiu parolinto estis videble tre sentema por la okazo.” “Jes,” respondis alia, “li estis evidente sen-tema.”

### KOMPATINDULO!

Kelkaj sinjorinoj sidis en klubo, diskutante la virtojn de siaj edzoj. “Sinjoro Bingleton,” diris unu el ili, aludante sian propran edzon, “ne drinkas, kaj neniam blasfemas; ja, li havas neniam malbonajn morojn.”

“Ĉu li iam fumas?” iu demandis.

“Jes, li ŝatas cigaron, ĵus manĝinte bonan manĝaĵon. Sed mi supozas ke, kutime, li ne fumas pli ofte ol unufojon ĉiumonate.”

### MALSUKCESO

“Bonege, Sinjoro Fredolino, vi venis ankaŭ tiun ĉi jaron al la marbordo kun viaj du filinoj. Ili fariĝas ĉiujare pli belaj kaj ĉarmaj.”

“Tio eble estas vera, sed ili grade maljuniĝas kaj ne ankoraŭ estas edzinigitaj. Ili efektive estas malfeliĉaj. Ili trovis favorindan homon kaj mi lin invitis konstante al la domo; kaj ĉar li ŝajne ĝius bonan manĝon, mi speciale por li dungis lertan kuiristinon, perfektan juvelon. Kaj kion vi opinias ke li faris?”

“Mi ne havas ideon.”

“Li edziĝis je la kuiristino.”

### TIO KION LI FARUS

Ĉe lernejo Vilhelmo havis grandan malfacilecon je siaj aritmetikaj problemoj, kaj lia instruisto vane penadis al li komprenigi tiujn ĉi. Fine, por plibone klarigi la aferon, la instruisto diris:

“Se mi irus en la butikon de via patro kaj dirus ke mi volas du funtojn da viando, kaj li havas nur unu funton kaj duonon, kion li farus?”

La knabo minuton profunde enpensiĝis, tiam respondis, “Li plenumus la pezmankon per sia dikafingro.”

H. S. BLAINE, No. 80.

## TRAGEDIETO EL LA LERNOLIBRO

1. Ĉu vi estas la spicisto?
2. Ne, sed mi estas bofrato de l'komizo de l'spicisto.
3. Estas sufiĉe. Donu do al mi tridekunu sepdeknaŭonojn de dekduo da funtoj da kafo.
4. Ho ĉielo! Vi ja estas en la neĝusta butikio.
5. Kion? Ĉu vi ne vendas kafon?
6. Certe, sed tiu kiun vi volas vidi estas matematikisto.
7. Adiaŭ. Vi min lacigas. Evidente, vi havas nenian emon je partumoj esperantaj.
8. Ne, sed mi havas ideon. Se vi insistas havi tian kvanton precizan, atentu. Aĉetu tutan dekduon da funtoj da kafo, kaj redonu al mi kvardek sepdeknaŭonojn da ĝi.
9. Sed kiamaniere mi pagos?
10. Tio estas facilega. Pagu por la tuta dekduo, kaj mi tenos por vi la kvardek sepdeknaŭonojn ĝis kiam vi bezonos kafon denove!

D. H. D.

## NOVA UZO DE LA LINGVO

Jen estas vera rakonto, kiu montras la ideon de kelkaj personoj pri la nova lingvo.

Ni antaŭ ne longe organizis grupeton por lerni Esperanton. Unu tagon sinjorino vizitis la prezidantinon. Ŝi diris:

"Mi deziras demandi pri la lingvo universala. Mi dunois lavistinon boheman, kaj mi ne povas kompreni solan vorton kiun ŝi parolas; ankaŭ ŝi ne povas min kompreni. Se mi lernos Esperanton, ĉu mi povos ŝin kompreni?"

CLARA L. TODSON.

## PROpono FINANCA

Studento venis al sia amiko kaj diris: "Pruntu al mi kvin markojn; mi elspezis tute mian monon."

"Mi estas malĝoja, sed mi bedaŭrinde havas nur tri markojn," respondis la amiko.

"Ne ĉagreniĝu; donu al mi tri markojn, kaj vi ŝuldos al mi du markojn."

## BONOvoleMA KOMPLeZI

Generalon Shermom oni foje demandis, kio estas la plej ridiginta afero kion li iam vidis dum la militado. La generalo rakontis jene:

"Iam mi pasis tra la soldatejo, kaj mi vidis Irlandanon, kiu provis rajdi obstinan, hufbantan mulon. La mulo fine efikis kroĉi unu postan hufon en la piedingon.

"*Be jaspers,*" diris la Irlandano, "se vi intencas suprenveni, mi malsuprenvenos!"

A. E. A. 185.

## "TWINKLE, TWINKE LITTLE STAR!"

Eta stela briletadu,  
Pri vi kiel mi miregas!  
Tiel alte super mondo  
Diamanto en ĉielo.  
Kiam post la sunsubiro  
Herb' per roso malsekiĝas;  
Tiam vi lumeton montras;  
Tutan nokton briletadu.  
En mallumo se mi estus,  
Por fajrero mi vin dankus;  
Kien iri mi ne vidus  
Se vi tiel ne briletus.  
Tiam kiam mi dormegas,  
Tra fenestro oft' vi serĉas;  
La okulon vi ne fermas  
Ĝis ĉiele suno estas.

Tradukita de W. M. Ampt. Ritmita de Profesoro A. M. Grillon. Aŭtoro ne konata.

## LA DIFERENCO

Knabineto, kies patrino estis posedanto de bela kreskaĵo, estis tre malfeliĉa tial ke la kreskaĵo ne prosperis, sed unu post unu la folioj mortis kaj defalis, ĝis la trunketo restis sola.

Sia patro diris al la patrino: "Eble vi ne sur ĝin sufiĉe da akvo verŝas?"

"Sed jes," ŝi respondis, "mi surverŝas sur ĝin ĉiutage."

"Do eble vi donas ĝin tro da akvo," li diris.

Sed la patrino estis certa ke ŝi donis al la kreskaĵo ĝuste sufiĉe.

Unu tagon, la knabineto venis en la domon kaj diris: "Patrino mi scias tion kio estas malbona kun via kreskaĵo."

"Kiu sciigis al vi?" demandis la patrino.

"Ni iris en la butikon de la floristo, kaj lin demandis pri la kreskaĵo, kaj kial ĝiaj folioj defalis. Unue, li diris, 'Via patrino ĝin donis tro da akvo,' sed mi diris 'Ne! ĉar paĉjo diris tion, kaj panjo diris ke si ĝin donis ĝuste sufiĉe.' Li diris, 'La kreskaĵo ripozadas. Ĉu vi ne ripozas iam?'"

"Kion vi diris?" demandis ŝia patrino.

"Ni diris 'jes, sinjoro, sed miaj brakoj kaj miaj kruroj ne defalas!'" H. F. W.

## TEMPERAROJ

"Ĉu vi havas la bonecon sciigi al mi kvin tagojn de la semajno, sen diri lundon nek mardon, nek merkredon, nek ĵaŭdon, nek vendredon, nek sabaton nek dimanĉon?"

"Mi ne perdos mian tempon. Tio estas neeble."

"Aŭdu al mi: antaŭhieraŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ kaj postmorgaŭ."

LUIS G. LEON.

## International Reviews printed *only* in Esperanto

<i>Internacia Scienca Revuo</i> (International Scientific Review) . . . Price Sm 2,75=	\$1.40
8 rue Bovy-Lysberg, Geneva, Switzerland.	
<i>La Revuo</i> —literary monthly—Dr. Zamenhof, Chief Collaborator . . . . .	\$1.40
Hachette et Cie., 79 Boulevard St. Germain, Paris, France.	
<i>Tra la Mondo</i> —illustrated monthly . . . . .	\$1.60
"Gazeto Tra la Mondo," Meudon (S. et O.), France.	
<i>Lingvo Internacia</i> —monthly—with 300 pages of literary supplement annually . . .	\$1.50
"Presa Esperantista Societo," 33 rue Lacépède, Paris (V <sup>e</sup> ), France.	
<i>Juna Esperantisto</i> (same address) . . . . .	\$0.50
<i>Espero Pacifista</i> —International Peace Magazine . . . . .	\$1.00
Gaston Moch, 26 rue de Chartes, Neuilly sur Seine, France.	
<i>Espero Katolika</i> —Roman Catholic Monthly . . . . .	\$1.00
Abbé Em. Peltier, Ste. Radegonde pres Tours (L. et L.), France.	
<i>Internacia Socia Revuo</i> . . . . .	\$1.20
R. Louis, 45 rue de Saintonge, Paris, France.	
<i>Esperanto Ligilo</i> —printed in "relief" for the Blind . . . . .	\$0.75
Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris, France.	

Sample copies of the above mentioned Journals cost one-tenth the year's subscription. Send U. S. postage stamps for sample copies, and *U. S. Postal Orders* for subscriptions. Use the following form for subscriptions:—

Estimata sinjoro,

Mi deziras aboni la . . . . . (journal) de la unua de  
 . . . . . (month). Mi sendas poŝtmandaton je \$ . . . . . por la abono.  
 (Name) . . . . .  
 (Address) . . . . .

## Esperanto: Auxiliary International Language

300 ORGANIZED SOCIETIES—20 JOURNALS

Supported and endorsed by many prominent men in Europe, Asia and America. London Chamber of Commerce holds regular Esperanto examinations.

For general information, for addresses of Esperanto magazines (British, French, German, Russian, Japanese, Polish, Swedish, etc.) and societies, for books, etc., write to the

### AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION

BOULEVARD STATION, BOSTON, MASS., U. S. A.

Bullen's Lessons . . . . .	\$0.26
Descriptive booklet, pamphlets, etc. . . . .	.10
Krestomatío (standard for style), paper . . . . .	1.00
Krestomatío (standard for style), cloth . . . . .	1.50

American Esperanto Journal, sample copy . . . . . .10

Send for price-list; all profits are spent for the advancement of the Esperanto "cause."

Send two-cent postage stamp for catalogues of the British Esperanto Association and of the Librairie de l'Esperanto (Paris). These are much more complete than that of the American Esperanto Association.

# “SERENADO”

*A New Song Published in Esperanto for High Voice*

*Sweet, Sparkling, Melodious*

“Should be a Favorite for Singers”

Music by Maria T. Bird

*Poetry by Montague C. Butler, L. R. A. M.*

PRICE 35 CENTS

**AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION**

**BOULEVARD STATION,**

**BOSTON, MASS.**

# “MI AŬDAS VIN”

*La unua kanto Esperanta eldonita  
en la U. Ŝ.; muziko de Sro. Herbert  
Harris; poemo de Dro. Leono  
Zamenhof. Facila por meza voĉo.*

PREZO: FR. 1.74 (35 CENTS);

5 EKZEMPLEROJ, FR. 7.50 (\$1.50)

**AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION**

**Boulevard Station,**

**Boston, Mass.**